

Ekumena kongreso en Strasburgo 2015

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 4 (913) • 2015 •



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
☎ +420311241406;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la tt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

ENHAVO

Prediko dum UK en Lille 2015	75
Ne ekzistas ... – se Kristo ne ĉeestas	77
La Vorto de Dio triumfas en Irano	78
Ekumena kongreso en Strasburgo – raporto	80
Amika korespondado	87
La fasto, plaĉa al Dio	88
Premio Deguĉi al Éva Farkas-Tatár	90
Post riĉa vivo mi ricevas eĉ premion! Dankon!	91
Protokolo de la jarkunveno	92
Astrid Hanke – nekrologo	94
Kiel riverego	96

Redaktoraj vortoj

Kiel kutime, post la somero kaj post la kongreso, mi revenis hejmen riĉigita. Grandan ĝojon donas la renkontiĝoj kun la mal/novaj geamikoj. Kaj ankaŭ pro la ebleco tuttage praktiki Esperanton.

Kelkaj partoprenantoj venis de UK en Lilo kaj kunportis la gajan informon ke nia ofta partoprenantino kaj kontribuanto Éva Farkas-Tatár gajnis la Deguĉi-premion. Vi povas legi pri tio en tiu ĉi numero. Ankaŭ ŝi atestas pri la riĉeco kiun ŝi ricevis pro Esperanto.

Mi nun rapidas al Poznań kie mi partoprenos kurson interlingvistikan. La studado devigas min legi multe da diversaj temoj kaj literaturo. Vere interese! Mi ne sciis ke tiom riĉa estas nia esperantoliteraturo.

La nuna numero ankaŭ enhavas raporton pri la kongreso. Se vi ĉi-jare ne havis eblecon partopreni, espereble vi povos ĉeesti sekvontjare. ☪

Gerrit BERVELING, NL

Karaj fratinoj, karaj fratoj, la hodiaŭan tekston el la *Evanĝelio laŭ Johano* (vidu paĝon 76) konas multaj homoj; tiun el la *Libro Reĝoj* supozeble nur malmultaj. Sed, tion aŭdante legata, verŝajne pluraj eksupozis konekton: ĉu la evangelistoj eble konante tiun tekston intence uzis ĝin?

Fakuloj pri Biblio tuj jesus. Kaj mi same: belega ekzemplo de miraklo fare de malnovtestamenta profeto – kiun Jesuo en la Nova Testamento do devus superi.

Sed se diri sincere, ĉu tio estas adolta maniero legi la Bibliajn tekstojn, serĉi tie detalojn, kvazaŭ temas pri kompetenteco? Ĉu vere temas pri tio, kiu kapablas superi kiun?

Eĉ lasante flanke ĉi tiun profeton, en la NT mem oni povus pli profundiĝi: en ĉiuj kvar evangelioj oni renkontas scenojn, kie Jesuo trafas homojn malsantajn kaj ĉie li nutras ilin. Sed estas sufiĉe grandaj diferencoj inter la maniero, kiel tion prezentas la malsamaj evangelistoj.

Por Biblio-studogrupo estus tre senc-

have, kune diskuti la similecojn kaj malsimilecojn inter la maniero, kiel Jesuo ĉiufoje traktas tiun temon. Sed hodiaŭ ni prefere tenu nin ĉe la teksto de Johano.

Tiu evangelisto – la plej malfrua el la konata kvaropo – datiĝas laŭ la fakuloj el la fino de la unua jarcento p.Kr. aŭ el la komenco de la dua jarcento, do ĉirkaŭ la jaro 100.

En pluraj detaloj foje li kvazaŭ kaŝe kritikis aŭ ĝustigas la estiĝantan ortodoksecon de la nova religio, kiu memstariĝas disde Judismo.

Sed ĉi tie laŭ mi, multe pli ol eventuala kontrastigo kun Judismo, gravas, ke centre en la nuna teksto Jesuo kvazaŭ substrekas la gravecon de tio, kion ni nomas la Sankta Manĝo aŭ la eŭĥaristio: ne tuj en la citita teksto mem, ĉar – kiel estas kutime ĉe niaj diservoj – ni nur legis mallongan scenon, sed la tuta teksto de tiu ĉapitro ampleksas ne 15, sed 71 versiklojn. Kaj en ĝi ja temas pri tio – tute centre –, ke Jesuo estas la pano, kiu malsupreniras de la ĉielo kaj donas vivon al la mondo. La homoj komence iom moke reagas, sed Jesuo

42 Venis homo el Baal-Ŝaliŝa, kaj alportis al la homo de Dio unuaĵon de pano: dudek hordeajn panojn kaj freŝajn grajnoj en sia saketo. Kaj ĉi tiu diris: Donu al la homoj, ke ili manĝu. 43 Lia servanto diris: Kiel mi povas tion doni al cent homoj? Sed li diris: Donu al la homoj, ke ili manĝu; ĉar tiele diras la Eternulo: Oni manĝos, kaj ankoraŭ iom restos. 44 Kaj li donis al ili, kaj ili manĝis, kaj iom ankoraŭ restis, konforme al la vorto de la Eternulo.

2 Reĝo 4, 42-44

pli emfazas kion li diris: la vera pano de Dio ne estas la manao, kiun vi konas el la rakontoj pri Moseo, sed tiu pano estas tiu, kiu malsuprenvenis el la ĉielo kaj donas vivon al la mondo – tiu, kiu venas por plenumi la volon de Dio, kiu min sendis. – Do, Jesuo en tiu sceno klare diras, ke li mem estas tiu pano de Dio por la mondo.

Oni kompreneble protestas – oni ja prenas la vortojn tro simple senperaj: oni ja ne estas kanibaloj!

Por ni homoj nuntempaj ofte estas granda problemo, ke ni volas preni ĉion, kion en la Biblio ni legas, sen ia ajn “dua aŭ simbola” senco: la teksto ja tion diras, kaj se en nia ĉiutaga percepto ni emus reagi: sed ho! Tio ne eblas! – tiam ni emas tuj reagi proteste.

Sed laŭ mi estus multe pli saĝe, se ion ni legas – unue ellegi la kompletajn tekstojn, vidi kion ili funde provas komprenigi al ni. Same kiel en la ĉiutaga vivo ni faras ĉiuj: legante, ke ĉe Harry Potter iu aŭto flugas tra la aero, ni simple plu legas, kaj ne sensprite protestas ke tio ja ne eblas.

Se en Mateo 9,6 ekzemple ni legas, ke Jesuo diras al paralizito: Stariĝu – kaj li ekstaris kaj foriris hejmen, tiam ni emas reagi: Tio ne eblas – aŭ temas pri trompo. Sed la teksto eble volis emfazi ion tute alian, ekzemple ke al la homoj Dio donis la eblon pardoni – (Mateo 9:8).

Miraklojn en la rakontoj ni lasu mirakloj, ĉar per tiuj rimedoj evoluas la rakontado.

Kion do hodiaŭ ĉe Johano ni legis?

Ke estas amaso da homoj, kiuj

1 Pli poste Jesuo transiris la maron de Galileo, t.e. de Tiberias. 2 Sekvis lin granda amaso, ĉar ili vidis la signojn, kiujn li faris pri la malsanuloj. 3 Jesuo eniris la montaron, kaj tie kun siaj lernantoj li sidiĝis. 4 Proksimis la Pasko, la Juda festo. 5 Kiam Jesuo levis la okulojn kaj rimarkis, ke alproksimiĝas granda amaso al li, li diris al Filipo: De kie ni aĉetos panojn, por ke tiuj manĝu? 6 Sed tion ĉi li diris por elprovi ilin. Li mem ja sciis kion li faros. 7 Filipo respondis al li: Eĉ ducent denaroj da pano ne sufiĉos por ili, ke ĉiu unuope ricevu eĉ peceton. 8 Unu el liaj lernantoj, Andreo, la frato de Simon Petro, diris al li: 9 Estas ĉi tie knabeto, kiu havas kvin hordeajn panojn kaj du fiŝetojn, sed kio estas tio por tiom <da homoj>? 10 Jesuo diris: Igu la homojn ekkuŝi. Estis tiuloke multe da herbo. Ili do ekkuŝis; la viroj ĉirkaŭ kvinmil. 11 Jesuo do prenis la panojn, eldiris la benon kaj disdonis al la kuŝantoj, kaj same el la fiŝoj, laŭdezure. 12 Kiam ili satiĝis, li diris al siaj lernantoj: Kunigu la restantajn rompaĵojn, por ke nenio perdiĝu. 13 Ili kunigis ilin, kaj plenigis dek du korbojn per rompaĵoj el la kvin hordeaj panoj, kiuj restis post la manĝigo. 14 Vidinte la signon kiun li faris, la homoj diris: Tiu ĉi vere estas la profeto, kiu venas en la mondon! 15 Ĉar Jesuo komprenis, ke ili venos perforte kuntreni lin por fari lin reĝo, li denove retiriĝis en la montaron – li sola.

...

sed mia Patro donas al vi la panon el la ĉielo – la veran. 33 Ĉar la pano de Dio estas la pano kiu descendas el la ĉielo por doni vivon al la mondo. 34 Ili diris al li: Sinjoro, por ĉiam donu do al ni tiun panon. 35 Diris al ili Jesuo: Mi estas la pano de la vivo. Kiu venas al mi, ne plu malsatos, kaj kiu fidus je mi, neniam plu soifos.

Johano 6, 1-15, 32b-35
[laŭ la traduko de Gerit Berveling,
La bona mesaĝo de Jesuo]

1 Paŭlo, apostolo de Jesuo Kristo per la volo de Dio, al la sanktuloj, kiuj estas en Efeso, kaj al la fideluloj en Kristo Jesuo: 2 Graco estu al vi kaj paco de Dio, nia Patro, kaj de la Sinjoro Jesuo Kristo. 3 Bena ta estu la Dio kaj Patro de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu benis nin per ĉia beno spirita en la ĉielejoj en Kristo; 4 kiel Li elektis nin en li antaŭ la fondo de la mondo, por ke ni estu sanktaj kaj senmakulaj antaŭ Li en amo; 5 antaŭdestininte nin por filadopto per Jesuo Kristo al Si mem, laŭ la aprobo de Sia volo, 6 al la laŭdo de la gloro de Lia graco, per kiu Li favoris nin en la Amata;

Efesianoj 4, 1-6


malsatas – ke Jesuo venas nutri ilin – ke la apostoloj (simbolo eble pri liaj = niaj eklezioj, kiu dirus?) ne scias, kion fari por solvi la problemon de la malsato, ke Jesuo sidigas la homojn. Li prenas la panon en la manoj, dankas super ĝi Dion, disdonas al la popolo; same pri la fiŝoj – kaj ĉiuj satiĝas. Kaj restas multe da fragmentoj, kiujn oni kolektis por ne malŝpari.

Ĉar la vera pano de Dio estas li, kiu venas el la ĉielo, kaj plenumas la volon de Dio – Jesuo.

Kio alia estu celata ol kion nuntempe ni nomas en niaj eklezioj la Sankta Manĝo aŭ la eŭĥaristio?

Ĉiuj kvar evangelioj – ĉiu en propraj vortoj kaj scenoj – rakontas pri tio, ke Jesuo estas tiu, kiun sendis Dio – kaj kiu instruas ankaŭ al ni, ke ni fariĝu liaj sekvantoj por lerni plenumi la volon de Dio.

Amen



Ne ekzistas ... – se Kristo ne ĉeestas

Ne ekzistas tia sistemo el kristanaj ideoj, kiu ankaŭ sen la kontribuo de la viva Jesuo Kristo estus valida kaj efika.

Ne ekzistas tia ideologio, kiun ni transprenas de niaj prauloj, komencas proklami kaj jen funkcias kristanismo.

La Vorto fariĝis karno: La vivanta kaj ĉeestanta Kristo estas la Vorto.

Eĉ pli akre dirante: ne tio estas kristanismo kion Kristo diris, sed Kristo mem estas kristanismo. Kion Li diris siatempe, antaŭ longe tion mi vane citas nun, se Li persone ne ĉeestas tie.

József FARKAS

La Vorto de Dio triumfas en Irano

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

La Vorto de Dio kreskis kaj pligrandiĝis.

Agoj 12, 24

Mi ĉerpas la informon por ĉi tiu letero el letero sendita de SAT-7 el junio de ĉi tiu jaro. SAT-7 estas la organizo kiu dissendas kristanajn programojn per satelito trans Nordan Afrikon, la Mezan Orienton, Iranon, kaj Turkujon.

La kristana religio kreskas pli rapide en Irano ol en iu ajn lando. Miloj da sekretaj preĝejanaroj funkcias tie, kaj tage novaj preĝejanaroj naskiĝas.

Virino kun epilepsio resanigita

SAT-7 PARS estas la 24/7 satelita kanalo por la lando de Irano. Patrino de tri etuloj, el tiu lando, telefonis al la konsila sidejo de SAT-7. Ŝi deziris ke ĉiuj vidantoj sciu ŝian rakonton.

'Sussano' (ne ŝia vera nomo) rakontis ke antaŭ kvin jaroj ŝi suferis pro severa epilepsio kaj ne povis labori. Ŝi diris ke ŝi 'ne havis vivon', ŝi sentis sin profunde deprimita, ke ŝi estis 'frapinta muron', kaj ŝi ne plu povis elteni tion. Do, Sussano decidis fini ĉion.

Ŝi eniris en sian ĉambron kaj fermis la pordon kun intenco sinmortigi. Sed unue, ŝi enlitiĝis tre lacigita ... kaj endormiĝis. Ŝi havis sonĝon, potencon vizon. Viro ĉirkaŭita de hela lumo

aperis: *"Sussano, mi estas Jesuo. Mi estas Dio. Sekvu Min."*

Ektimigita, ŝi vekigis. Ŝi havis neniun ideon kion la vizio signifis aŭ kiu estis la viro. Ŝi konis neniun kristanon kaj ŝi neniam estis leganta la Biblion. Forgesinte siajn pensojn pri sinmortigi, Sussano estis pelita scii plu.

Ŝi tuj informis sian edzon pri la vizio. Li tre koleris kaj diris: *"Vi pekas. Se vi daŭrigas paroli pri Jesuo, vi estos malakceptota, ĉar vi malakceptas Dion."*

Malgraŭ la opinio de la edzo, Sussano iris al la loka biblioteko. Kiam ŝi demandis al bibliotekisto se estas Biblio tie, li severe respondis: *"Kion vi faras? Ĉi tio estas malpermesita; vi ne devas serĉi Biblion! Tio estas kontraŭleĝa."*

Sed laŭ la tempo de Dio, Sussano renkontis kristanon, kaj lia familio helpis ŝin akiri Biblion. Ŝi komencis legi ĝin; legante la Evangeliojn ŝi renkontis Jesuon kaj fariĝis kredanto.

Do, Sussano telefonis la sidejon de SAT-7: *"La Sinjoro [Jesuo] resanigis min el la epilepsio. Li donis al mi la vivon. Mi ne telefonas kun demando. Mi nur deziras ke vi surbendigu mian ateston por la vidantoj de SAT-7 PARS."*

Kelkajn tagojn poste, la programa gastiganto aŭdigis la ateston de Susano. Ŝia laŭdo por la Sinjoro, ŝia eltrovo ke Jesuo estas Dio, la rakonto pri ŝia resaniĝo eniris en la hejmojn de milionoj da irananoj. Estis tre speciala momento.

Juĝa persekutisto kapitulacas al Kristo

La iranaj regantoj ege klopodas sufoki la rapidan kreskadon de la sekretaj kristanaj preĝejanaroj en sia lando per policaj atakoj, batoj, torturoj, enkarcerigoj, kaj eĉ ekzekutoj.

Lili estis gvidanto de sekreta preĝejanaro. La irana polico arestis ŝin kaj forportis ŝin al la malliberejo. Dum tri tagoj la policanoj furioze pridemandis ŝin kun tiaj demandoj kiel: “Kiu estas la aliaj gvidantoj de via preĝejanaro? Kie ili kunvenas? Kiu el viaj konatoj

fariĝis kristanoj? Kie estas la Biblio?” La pridemandoj estis penigaj sed ŝi ne malfortiĝis.

Subite, inspirita de la Sankta Spirito, Lili respondis: “*Estas honoro ĉe mi paroli pri Jesuo. Vi bezonas Jesuon en via vivo. Mi deziras ke vi spertu la ĝojon kaj la benon de la savo. Mi ne povas silenti pri ĉi tio.*”

Vanigitaj, la policanoj metis ŝin en izolatan enkarcerigon. Tiam, ŝia juĝa persekutisto venis al ŝi en la meza nokto. Li deziris scii pli pri la Evangelio. Lili: “*Dum horoj ni parolis pri Jesuo ĝis ke li kapitulacis al Jesuo. Ni preĝis kune.*”

Tiel “*la Vorto de Dio kresk[a]s kaj pligrandiĝ[a]s.*” (La Agoj 12: 24)



El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

21. septembro

Patro en la ĉielo, benu la klopodojn de la homoj, kiuj aktive laboras por la paco. Ili trovu la ĝustajn metodojn, ekonomiajn kaj sociajn, por ke naskiĝu daŭra paco inter la homaro.

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 74).

Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.



Ekumena kongreso en Strasburgo 2015

“Donu al mi trinki” (Johano 4,7)

Raportas Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Ĉijare inter 1a kaj 8a de aŭgusto ni estis invititaj al ekumena kongreso al Strasburgo, Francio.

Nia kongresejo “Ciarus” estas junulara gastejo, kiu situas proksime al la urbocentro en silenta strato. Teretaĝe troviĝis la manĝejo kie ni laŭdezire povis elekti inter bongustaj manĝaĵoj. En la unua etaĝo ni havis salonon, ekipite per modernaj teknikaĵoj (laŭtigilo, projektoro), eble la plej grava ilo estis inter ili la aera klimatizilo.

En komfortaj 2-3-4 litaj ĉambroj kun duŝejo kaj necesejo ni dormis en la etaĝoj. Liftoj ankaŭ servis nian komforton.

SABATE vespere, post longa/mallonga vojaĝo ni alvenis al la kongresejo kaj post iom da ripozo kaj verspermanĝo ni havis mallongan interkonan vesperon, kiun finis per preĝo Philippe COUSSON (FR) laŭ la preĝo de la broŝuro de la

Semajno de Unueco 2015. Tiun broŝuron ni sekvis je la matenaj preĝoj dum la semajno.

Ĉiujn matenojn ni komencis per matena meso en Kapelo de Toussaint (Fratulinoj de Karitat), kiu troviĝis en la proksimeco de nia kongresejo. Post la matenmanĝo la matenan preĝon ni preĝis laŭ la broŝuro. Poste ni ĉiam kantis per la afabla gvidado de Albrecht KRONENBERGER (DE) kaj pianoakompano de Stefan LEPPING (DE). Ofte violon-akompanis Agneta JÄRLSTRÖM (SE).

DIMANĈE post la oficiala malfermo kaj salutoj, ni iris al la preĝejo Sankta Petro Juna Katolika, kie celebris la sanktan meson pastoro Benoît ENTE (FR).

Post la tagmanĝo ni promenis al la “alia” preĝejo Sankta Petro Juna, kiu estas protestanta, luterana preĝejo. La loka pastoro, sinjoro Philippe EBER

Albrecht Kronenberger, Stefan Lepping, Agneta Järnlström





Supre: la preparo de la Sankta Manĝo

Sube: enkonduko fare de G. Daminelli kaj P. Cousson

montris al ni la vidindaĵojn kaj rakontis pri la interesa historio de la preĝejo.

Je la 15:30 ni havis ekumenan diservon per la kunlaboro de Philippe EBER, Benoît ENTE, Philippe COUSSON, Giovanni DAMINELLI (IT) kaj Gerrit BERVELING (NL), kiun sekvis je la 17a koncerto de juna loka franca orgenisto. Kaj la ekumena diservo kaj la orgenkoncerto estis malfermita ankaŭ al lokanoj.



Post la verpermanĝo okazis la oficiala inaŭguro. Per siaj prelegetoj Giovanni DAMINELLI kaj Philippe COUSSON enkondukis nian ĉijaran kongresan temon: “Donu al mi trinki” (Joh 4,7), kaj fine per kortuŝa vesperpreĝo fermis la tagon Bengt Olof ÅRADSSON (SE).

LUNDE, post la ĉiamaj matenaj programoj, ni aŭskultis du tre interesajn prelegojn: unue Gerrit BERVELING prelegis pri la interreligia dialogo, poste Gerard SIEDWALT (FR) emerita teologa profesoro saĝe parolis pri tio, ke niaj





Gvidataj vizitoj al kaj en la preĝejoj

diversaj religioj devas lerni pace vivi unu kun la alia. Neniu religio estas super la aliaj!

Posttagmeze ni vizitis kelkajn gravajn vidindaĵojn de Strasburgo. Unue, kompreneble, la imponan katedralon, kiu ĉijare festas la mil-jariĝon de sia fondado. Ankaŭ estis interese ekkoni alian luteranan preĝejon, kiu ricevis la nomon de Sankta Tomaso.

La moderna metodista preĝejo troviĝas en la unua etaĝo de loĝdomo en la belega kvartalo “La Petit France”. Teretaĝe ili havas grandiozan Biblio-ekspozicion. Je la komenco de la jaro 2015 la tuta Sankta Biblio estas tradukita al 542 lingvoj!

La lasta programero de nia longa urbovizito estis vizito al Rumana Ortodoksa preĝejo. Ilia ĉarma pastoro rakontis ne nur pri la historio de ilia preĝejo, sed ankaŭ pri iliaj ceremonioj, kutimoj, pri la dekoracioj, ikonoj, eĉ pri la simbolo de la koloroj de la ikonoj.

Post la vespermanĝo kun ĝojo ni salutis en nia rondo la reprezentantojn de lokaj kristanaj eklezioj kaj la gvidanton de la strasburga Esperanto klubo, kiuj prezentis sin kaj ankaŭ ni iom prezentis nin kaj niajn organizojn.



Mats legas brajlan Biblion en la ekspozicio



Karl-Heinz
Schaeffer



Zhang
Fude



Ágnes
Ráczkevy-
Eötvös



Benoît Ente

La vesperan preĝon en tiu ĉi vespero mi, Ágnes Ráczkevy-Eötvös (HU) gvidis.

MARDE antaŭtagmeze pluraj interesaj prelegoj sekvis unu la alian. Unue Siegfried KRÜGER (DE) parolis pri sia urbo Heilbronn kaj pri la Kristoforo-legendo. Poste bibliotekistoj Karl-Heinz SCHAEFFER (DE) kaj Philippe COUSSON rakontis pri siaj laboroj kaj kompreneble pri la solvindaj malfacilaĵoj.

Nia ĉina gasto, Zhang Fude kun lum-bildoj prelegis pri la malfacila kristana vivo de siaj geavoj. Stefan LEPPING donis la titolon al sia prelego “Fido-Individuo-Socio”. Maria BELOSEVIC (HR) de IKUE kaj Pavel POLNICKÝ (CZ) de KELI informis nin pri la diversaj kongresplanoj al la jaro 2016. (Poste la jarkunsido de KELI decidis pri la sekvontjara KELI-kongreso en Bratislava inter 16a kaj 23a de julio 2016. La aliĝilon vi trovos en la sekvonta numero de Dia Regno)

Posttagmeze, post iom da ripozo, ni denove iris al la preĝejo Sankta Petro Juna Katolika, kie ni havis nian diamanĉan sanktan meson. Tiam ni ne havis eblecon ekkoni la preĝejon, do kun ĝojo kaj per saĝa gvidado ni nun faris tion.

Post la vespermanĝo en la preĝejo Sankta Petro Juna Protestanta donis koncerton Stefan LEPPING. Li faris interesajn kaj belajn improvizaĵojn al kantoj de diversaj nacioj de Adoru (401, 368, 357, 749, 675 kaj 597).

Post la koncerto en la preĝejo gvidis la vesperan preĝon Albrecht KRONENBERGER.

MERKREDO estas nia tradicia ekskursita tago: per aŭtobuso ni vizitis unue la belegan, ĉarman urbeton Obernai. Poste ni iris al la monto kaj monaĥejo de Sankta

Odilia. Dum pastoro Benoît ENTE rakontis al ni la interesan vivhistorion de la sanktulino, ni povis tagmanĝi, kiun ni ricevis en pakaĵoj, en la ombro de grandaj arboj. La lasta haltejo de nia ekskurso estis Gertwiller, la vilaĝo de spicpano. Ni aŭskultis la bakiston pri la tradicia teknologio kaj receptoj kiel ili kaj iliaj antaŭuloj jam ekde pli ol cent




Ĉe la monaĥejo de Sankta Odilia

jaroj bakas la bongustajn dolĉaĵojn, kaj bonŝance ni povis ankaŭ gustumi ilin kaj en la vendejo aĉeti ilin. La simpatia posedanto komencis kolekti kaj gardi la plej diversajn hejmajn, kuirejajn objektojn de siaj prauloj, kaj poste el la tuta ĉirkaŭaĵo – nun jam pli ol dek mil objektoj troviĝas en la malgranda muzeo en la unua etaĝo de ilia produkteja-vendeja domo.

Tuj post la vespermanĝo Anna kaj Mats LANDFORS (SE) faris la vesperan preĝon. Kaj je la fino de tiu ĉi enhavriĉa tago Benoît ENTE montris ankoraŭ al ni filmon pri tradicia marŝado kaj pilgrimado al la monto de Sankta Odilia.



Anna Landfors (kaj Mats) gvidas la vesperpreĝon



Stefan Lepping aŭskultas la spicbakiston



Emmanuel Wald

ĴAŬDE antaŭtagmeze ambaŭ organizoj havis jarkunvenon. Kiel kutime, la protokolon de la jarkunsido de KELI vi povos legi en tiu ĉi post-kongresa numero de Dia Regno.

Posttagmeze ni vizitis la Eŭropan Parlamenton kaj la Sinagogon de la Paco. En ambaŭ lokoj la entuziasmaj gvidantoj estis pretaj senlace respondi al ĉiuj niaj demandoj.

Vespere Benoît ENTE projektis filmon pri la historio de eŭropa kunlaboro, ĝia elformiĝo kaj la funkciado de Eŭropa Unio.

La tagon fermis la vesperpreĝo de Maria LÁSZLO (RO) kune kun Oldřich FISCHER (CZ).

VENDREDE antaŭtagmeze unue Gerrit BERVELING prelegis pri la frukristana literaturo, poste Bruno MASALA (FR) parolis pri la kvara evangelio. Fermis la vicon de la prelegoj Emmanuel WALD (FR) pri la mezepoka ekzegezo.

Post la prelegoj okazis proteŝtanta diservo kun sankta manĝo. Predikis Gerrit BERVELING kaj Philippe COUSSON.

Kelkaj de ni eluzis la eblecon de la libera posttagmezo al ŝip-ekskurso sur la kanaloj



Maria Lászlo kune kun Oldřich Fischer gvidas la vesperpreĝon

La KELI-jarkunveno



kaj rivero de Ill. Ni vidis belegajn vidindaĵojn, dufoje uzis ankaŭ kluzon, sed kio estis la plej interesa: surŝipe ni aŭskultis la inform-tekston esperantlingve, dank' al la laboro de la lokaj esperantistoj!

Post la vespermanĝo ni bone emuziĝis dum la adiaŭa vespero kiun organizis kaj gvidis Samuel GAILLARD (FR).

Je la fino de la vespero ni ankaŭ dankis niajn helpantojn: al la pastoro Benoît ENTE la tutsemajnan servon, al

Victor SIMONNET (FR) la multe da teknika helpo kaj kompreneble al la du zorgemaj LKK-anoj, Philippe COUSSON kaj Samuel GAILLARD – ĉion.

Post la vespera preĝo ni adiaŭis tiujn, kiuj jam nokte aŭ frumatene devis komenci la vojaĝon al sia hejmo.

SABATE post la matena meso, matenmanĝo kaj matena preĝo ni fermis nian ĉijaran kongreson.

Ĝis revido sekvontjare en Bratislava!

Sigfried Krüger kaj Sieglinde Stamm



Tri "frankofonoj"



Glaciajpaŭzo



Zhang Fude kaj Samuel Gaillard

Amika korespondado

Antaŭ ĉio mi prezentu min: mi nomiĝas s-ro Honoré Sebuĥoro Ndarihорanye, edziĝis, kun 5 gefiloj loĝanta en orienta provinco kivu /DR Kongo kaj gastigas unu orfinon de 13j hejme, kiu ne havas eĉ unu el siaj familianoj. Ĉiuj estis mortigitaj dum la pasinta milito en 2010. Ni loĝas en teritorio Rutshuru kiu situas je 75km de Goma urbo. Rutshuru estas centreto, apud la landlimo de nia najbara lando Ugando. Tial ni ofte uzas poŝtadreson el Ugando kvankam ni estas konganoj.

Mi esperantiĝis en 2006, kaj iĝis individua ano de UEA (UEA konto: hose-t). En 2009 mi kreis aktivan e-klubon – Verda Stelano-Klubo. En 2012 mi enkondukis E-instruadon en nia instituto Béthanie Rutshuru ĝis nun. Tie mi estas laborulo E-Instruisto pri zoo-logio, matematiko, Esperanto.

Ni volas amikiĝi kun vi per korespondado kaj interŝanĝi niajn kulturojn kun nia E-grupo. Ni volas krei ĝemel-igon tra via E-Asocio aŭ klubo. Ni ŝatas naturon (ekologio), turismon, kulturon, legaĵon, ktp.

Ni jam enkondukis E-kurson en la orfejo de post 2011. Plie, ni enkondukis E-kurson en stacion Radio Alliance FM/civito Kiwanja. Ĉiu sabato ni elsendas E- mesaĝojn, informojn, kursojn, kantaĵojn ktp.

Nia E-klubo V.S.K jam kreis alian subsekcion Amikeca E-Klubo-n en Tongo loko je 18 km. Tiu klubo estas gvidita de Innocent Baraka.

Esperanto en Afriko floras. Ni ne ĉesu progresigi nian karan lingvon en la kvaraj tutmondaj anguloj. Ni neniam forlasis Esperanton ĉar ĝi kunigas multajn naciojn. Plie, pere de tiu ĉi ni komunikas kun la tuta mondo. Verdire, kiam mi aŭdas la vorton (Esperanto) mi sentas admiron, flugon, inspiron kaj ĝojon. Do, mia vivo estas firme ligita kun E-o kaj kun miaj geamikoj. Fine, mi ĝuas ne nur la lingvon mem, nek la ŝatatan de mi legadon de E-libroj, mi ĝuas ankaŭ la interrilatojn de la klubanoj. Restu kunligita por esti en ronda familio. Ni multe interŝanĝos esperantajn ideojn pri la diskonigo de nia karega lingvo Esperanto.

Plej amike!

Honoré Sebuĥoro
Eglise CEBCE REMERA
PO BOX 08 BUNAGANA
KISORO/UGANDA.
RETE: honsebn@gmail.com
Tel.+243 99 78 52 933

Klubo: vsklubo@gmail.com

La fasto, plaĉa al Dio

Kvina parabolo el LA PAŜTISTO

el la Greka tradukis Gerrit BERVELING, NL

La tria parabolo estis publikigita en DR 1/2015, la kvara en DR 3/2015. La verkaĵo LA PAŜTISTO de la frukristana profeto Hermas, estis verkita en la tempo inter 100 kaj 150 p.Kr.; oni asertas, ke li estis frato de Pio la 1-a, la episkopo de Romo (145-155).

Kvina parabolo

1[54]:1 Dum fastotago mi sidas sur monto, kaj dankas la Sinjoron pro ĉio, kion Li faris por mi, kaj tiam mi vidas la paŝtiston eksidi apud mi; li diris:

Kial frumatene vi venis ĉi tien?

Ĉar, sinjoro, – mi diris – mi faras stacion.

2 Kio – li diris – estas stacio?

Mi fastas, sinjoro – mi diris.

Fastado – li diris – kio estas?

Kiel mi kutimas, sinjoro – mi diris – tiel mi fastas.

3 Vi – li diris – vi ne scias fasti por la Sinjoro, kaj ne estas tio fastado, tiu senutila <fastado>, kiun vi fastas por Li.

Kial – mi diris –, sinjoro, tion vi diras?

Mi diras tion al vi – li diris – ĉar tio ne estas fastado, en kiu vi pensas fasti por la Sinjoro; sed mi instruos al vi, kio estas kompleta fastado kaj plaĉa al la Sinjoro. Aŭskultu – li diris al mi. 4 Dio ne deziras tian vanan fastadon; ĉar tiel fastante por Dio nenion vi faras por justeco. Sed fastu do por Dio jenan fastadon: 5 ne faru malbonon en via

vivo, estu sklavo de Dio kun pura koro; gardu Liajn ordonojn kaj promenu laŭ Liaj reguloj, kaj neniu malbona deziro leviĝu en via koro; fidu je Dio; kaj kiam tion vi faras kaj havas timon antaŭ Li kaj detenas vin de ĉiu malbona ago, tiam vi vivos antaŭ Dio. Kaj se tion vi faras, vi faras grandan fastadon, kiu estas plaĉa al Dio.

Parabolo pri la sklavo kaj la vitejo

2[55]:1 Aŭskultu la parabolon, kiun mi rakontos al vi koncerne la fastadon. 2 Iu havis kampon kaj multajn sklavojn, kaj parton de sia kampo li priplantis kiel vitejon. Li elektis certan sklavon, kiu estis fidinda, plaĉa kaj honorata, kaj diris al li:

Prenu tiun vitejon, kiun mi plantis, kaj metu palisaron ĉirkaŭ ĝi, ĝis mi venos, sed nenion alian vi faru pri la vitejo. Tiun mian ordonon vi gardu, kaj vi estos libera en mia domo. Kaj la mastro de la sklavo foriris eksterlanden.

3 Kiam li foriris, la sklavo prenis la vitejon kaj metis la palisaron. Kaj

fininte la palisaron de la vitejo, li vidis, ke la vitejo plenas je trudherboj. 4 Li do pensis en si mem: Tiun ordonon de mia mastro mi plenumis; mi do cetere prifosos tiun vitejon, kaj ĝi fariĝos tute ordigita, kaj sen la trudherboj ĝi donos pli da fruktoj, ĉar la trudherboj ne sufokos ĝin. Li prenis kaj prifosis la vitejon, kaj ĉiujn trudherbojn, kiuj estis en la vitejo, li elŝiris. Kaj tiu vitejo fariĝis plej bonstata kaj floranta, ĉar trudherboj ne sufokis ĝin.

5 Post iom da tempo venis la mastro de la sklavo kaj de la kampo, kaj li eniris la vitejon. Kaj vidante la vitejon bone palisarumita, kaj krome prifosita kaj senigita de ĉiuj trudherboj, dum ĉiuj vitoj floris, li ege ĝojis pri la agoj de la sklavo. 6 Alvokinte do sian amatan filon, kiu estis lia heredonto, kaj la amikojn, kiuj estis liaj konsilantoj, li diris al ili, kion li ordonis al la sklavo, kaj kiel multe li konstatis lin esti farinta. Kaj ili kunĝojis kun la sklavo, pro la atesto, kiun donis pri li la mastro. 7 Kaj li diris al ili:

Al tiu ĉi sklavo mi promesis la

liberecon, se la ordonon, kiun mi donis al li, li povas gardi; kaj li gardis mian ordonon kaj krome faris bonan laboron pri mia vitejo kaj li ege plaĉis al mi. Komence pro tio, kion li faris, mi volas fari lin kun-heredonto de mia filo, ĉar kiam bonan ideon li ekhavis, li ne forpuŝis ĝin, sed plenumis ĝin. 8 Pri tiu opinio la filo de la mastro konsentis kun li, ke kun-heredonto kun la filo fariĝu la sklavo.

9 Post kelkaj tagoj lia mastro preparis festenon, kaj li sendis multajn manĝaĵojn. La sklavo prenis ĉion, kion sendis al li la mastro, kaj prenis kio sufiĉis por li, sed la ceteron li disdonis inter la kunsklavoj. 10 Liaj kunsklavoj prenis la frandaĵojn, ĝojis kaj komencis preĝi pri li, ke li havu pli da favoro ĉe la mastro, ĉar tiel bele li traktis ilin.

11 Ĉiujn ĉi okazaĵojn aŭdis lia mastro, kaj denove li ege ĝojis pri la agado. Denove kunvokis siajn amikojn la mastro kaj la filon, kaj rakontis al ili, kion faris la sklavo pri la manĝaĵoj, kiujn li ricevis; kaj ili des pli aprobis tion, ke la sklavo fariĝu kun-heredanto



Korespondi deziras

Saluton, mi estas lernejestro de nia amata lingvo en Kongolando, suda kivuo provinco, urboj Bukavu kaj Uvira.

Mi ŝatus interŝanĝi ideojn kun vi pri religio, politiko, agrikulturaj projektoj, manmetioj, turismo kaj pri Esperanto, se kompreneble vi ekesprimus vian konsenton.

Mi instruas Esperanton al georfoj inter ses kaj deksep jaroj. Mi fondis etan Farmon.

Mi multe interesiĝas ankaŭ pri agrikulturaj projektoj, abelbredado ktp.

Kore salutas vin,
Mana N. Brinson

mana.esperanto.brinson@gmail.com

Premio Deguĉi 2015 al Éva Farkas-Tatár

Laŭ la UK kuriero Belfrido

Premio Onisaburo Deguĉi estis starigita per donaco de Oomoto en 1987 kaj konsistas el diplomo kaj monsumo de 2000 eŭroj. Ĝi estas aljuĝata pro meritoj en la utiligo de Esperanto laŭ la idearo de d-ro Zamenhof kaj Onisaburo Deguĉi, kaj pro kontribuo al la celo de UEA kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

En 2015 la premion ricevis s-ino Éva Farkas-Tatár el Hungario. Ŝi naskiĝis en 1924 kaj lernis Esperanton en 1961. En 1962 ŝi partoprenis la UK en Kopenhago, kiu tiom ravis ŝin, ke ŝi decidis dediĉi sin al la instruado de Esperanto. Por perfektigi pri tiu arto ŝi iris al la UK en Hago en 1964 por sekvi lecionojn de Andreo Cseh. Tiel komenciĝis 50-jara instrua agado en multaj landoj kaj ĉe multaj UK-oj k.a. renkontiĝoj. Ŝi revenigis la Cseh-metodon al ĝia kerno: la gaja, luda maniero, dank' al kiu la lernantoj tuj ekparolas esperante. Tiun arton ŝi transdonis al multaj novaj instruantoj, kiujn ŝi trejnigis per Cseh-seminarioj, interalie en UK-oj.



Antaŭaj premiitoj

- 1987: Hans Bakker el Nederlando
- 1988: Ralph Harry el Aŭstralio
- 1989: Internacia Kultura Servo, Kroatio
- 1990: Jacques Tuinder, el Nederlando
- 1991: Sylla Chaves el Brazilo
- 1992: Bruno Vogelmann el Germanio
- 1993: Esperanto-Redakcio de Pola Radio
- 1994: Claude Piron el Svislando
- 1995: William Auld el Britio
- 1996: Dimitar Terziev el Bulgario
- 1997: Kastelo Grezijono, Francio
- 1998: Helga Farukuoye el Aŭstrio
- 1999: Heinz Schindler el Germanio
- 2000: Rob Moerbeek el Nederlando
- 2001: Koresponda Servo Mondskala
- 2002: dividita inter Ma Young-tae kaj LEE Jung-kee el Koreio
- 2003: dividita inter Don Harlow el Usono kaj Franciska Reisel el Germanio
- 2004: Marjorie Boulton el Britio
- 2005: Monato (gazeto)
- 2006: Simo Milojeviĉ el Nederlando
- 2007-8:
- 2009: la muzika eldonejo Vinilkosmo
- 2010: Philippe Chavignon
- 2011: Hori Jasuo el Japanio
- 2012: Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia
- 2013: lernu!
- 2014: Stano Marĉek

Éva Farkás ricevas la premion el la mano de Stefan McGill, vicprezidanto de UEA, en la konversacia klubo en Budapeŝto, kiu ŝi daŭre gvidas.



KONGRESA KURIERO DE LA 100-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Belfrido

Dumando, 2 aŭgusto 2015

N-ro 7

Post riĉa vivo mi ricevas eĉ premion! Dankon!

Karaj Gesamideanoj, Geamikoj, Gefratoj! Kiam mi ekaŭdis, ke la premio Degučĉi ĉijare estis aljuĝita al mi, unue mi estis tre surprizita. Kelkfoje mi aŭdis kiam dum Universalaj Kongresoj oni solene deklaris tion kaj distingis eminentajn personojn, grupojn sed en plej foraj anguloj de mia koro ne aperis la ideo, ke foje ankaŭ min...

Dum mia longa esperantista vivo kiam mi povis instrui, prelegi, organizi, gvidi, intervjui aŭ simple partopreni, mi travivis tiom da ĝojo, spertis tiom da afableco, bonvolo, ke mi ĉiam sentis min riĉigita, mi sentis ke mi ricevis multe pli ol kiom mi povis doni.

Mi memoras pri ĉarmaj, lernemaj grupoj, entuziasma publiko, atentemaj, brilaj okuloj! Kiom da afablaj, interesaj homoj! Kiom da eminentuloj, kiuj volonte donis intervjuojn, rakontis pri si mem, pri sia laboro, pri cirkonstancoj, problemoj aŭ raportis pri sukcesaj solvoj. Kiom da riĉeco de la homa vivo en kiun mi rajtis enrigardi! Kaj post tia vivo mi ricevas eĉ premion!

Mi estas sincere profunde kortuŝita!
Dankon!

Éva Farkas-Tatár



Fotis Ágnes Ráczkevy-Eötvös



Protokolo de la jarkunveno 2015 de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) Strasburgo 2015-08-06, partoprenis: 24 kelianoj kaj 3 gastoj

1. Malfermo

Prezidanto Philippe Cousson malfermis la jarkunvenon.

2. Elekto de protokolantoj

La protokolantoj Gabriella Stier, Agneta Järnlström, Oldřich Arnošt Fischer estis elektitaj.

3. Akcepto de la tagordo

La tagordo de la jarkunveno estis aprobita.

4. Komunikoj

Sekretario Pavel Polnický salutis la jarkunvenon nome de sia frato.

5. Funebra memorigo

Forpasintaj kelianoj estis honoritaj per unuminuta funebra memorigo.

6. Jara raporto de sekretario

Revuo Dia Regno estas eldonata en eldonkvanto 300 ekzempleroj. Pavel Polnický dissendas DR al 35 landoj (19 eŭropaj kaj 16 ekstereŭropaj landoj).

7. Jara raporto de kasistino

Tuta jara raporto de la kasistino estis publikigita en Dia Regno, 3, 2015, 66-69. La kasistino Ágnes Ráczkevy-Eötvös informis pri financa situacio de KELI en la jaro 2014, kiam aktivoj same kiel pasivoj estis same 48.821,62 €. La kasistino diris, ke financa situacio de KELI estas certa kaj sekura.

8. Raporto de kontrolantoj de kaso

Karl-Heinz Schaeffer kun Norbert Süderland estas en kontakto kun la kasistino, kiu ĝustatempe sendis al ili informojn. La kasistino bone laboras.

9. Diskuto kaj akcepto de la raportoj

Ágnes Ráczkevy-Eötvös petis kelianojn informi la sekretarion pri agadoj en KELI.

Pavel Polnický renkontis en Universala Esperantista Kongreso en Lillo kelkajn personojn, kiuj laboras ekster KELI (ekz. Leif Nordenstorm).

Emmanuel Wald proponis fondi retpaĝon de KELI en Facebook (FB).

Philippe Cousson respondis, ke KELI jam havas sian retpaĝon en FB. Siegfried Krüger demandis, ĉu oni sen aliĝo povas rigardi la paĝojn de FB. Philippe Cousson respondis, ke oni sen aliĝo povas rigardi la paĝojn de FB.

Sabolcs Birta laŭdis la sekretarion, ke kongresoj de KELI estas malmultekostaj.

La jarkunveno akceptis la raportojn.

10. Budĝetoj

Ágnes Ráczkevy-Eötvös diris, ke la budĝeto por la jaro 2015 estas malaltigita. La jarkunveno akceptis la budĝeton por la jaro 2016 (Dia Regno, 3, 2015, 68-69).

11. Raporto de la redaktoro

Bengt Olof Åradson informis, ke la revuo Dia Regno estis eldonita sesfoje

dum la jaro, sed ne ĉiam regule. Li dankis al Mária László kaj Albrecht Kronenberger pro interesaj kontribuoj kaj admonis kelianojn, sendi kontribuojn pri tio, pri kio povas interesiĝi aliaj legantoj de Dia Regno. La redakcio bezonas scii, kiujn artikolojn la legantaro ŝatas aŭ malŝatas.

Szabolcs Birta plendis, ke lian artikolon pri medicino la redakcio ne publikigis. Li verkis artikolon pri filozofio. Bengt Olof Åradson antaŭĝojas pri tiu artikolo.

Mats Landfors dankis, ke Dia Regno ekzistas ankaŭ en Brajla versio.

Bengt Olof Åradson atentigis, ke en Kristanaj fontoj ekzistas kolora versio de Dia Regno, sed la lastan version oni povis legi nur uzante ŝlosilkodon. Se iu volas ricevi Dian Regnon perrete, li povas informi la redaktoron.

Emmanuel Wald interesiĝis pri la ŝlosilkodo. Ágnes Ráczkevy-Eötvös respondis, ke Albrecht Kronenberger ofte ŝanĝas la ŝlosilkodojn.

Norbert Südland atentigis, ke la tipoj de literoj iam kaŭzadas problemojn kun notoj.

La raporto de la redaktoro estis aprobita.

12. Estrarelektio

Philippe Cousson informis, ke en la jaro 2015 finiĝas la 3-jara deĵora periodo de Bengt Olof Åradson kaj Zoltán Somhegyi. La jarkunveno ambaŭ reelektis.

13. Kongresplanoj

Pavel Polnický informis, ke venonta kongreso de KELI (2016) okazos en Bratislava (Slovakio) ekde la 16-a ĝis la 23-a de julio 2016.

En studenta hejmo estas 1-, 2- kaj 3-litaj ĉambroj.

Garantiaj sumoj por partoprenontoj el postsocialismaj landoj (kategorio A) estas 10 €, 20 € kaj 30 €, garantiaj sumoj por partoprenontoj el pli riĉaj landoj (kategorio B) estas 30 €, 40 € kaj 50 €. Restadkosto por la kategorio A estas 190 €, por la kategorio B 320 €.

[Aliĝilo troviĝos en DR nro 5/2015, red]

14. Proponoj kaj sugestoj de la membroj

Ni ne scias, kiam kaj kie okazos la kongreso de IKUE.

Kongreso de KELI en la jaro 2017 povas okazi en Zöblitz (Germanio), kien nin invitas Wolfram Rohloff. La jarkunveno aprobis la proponon.

15. Fermo

Philippe Cousson finis la jarkunvenon.



La estraro: Pavel Polnický, Philippe Cousson, Siegfried Krüger, Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Bengt Åradsson, Samuel Gaillard



Astrid HANKE

1936 –2015

Kaj mi restos en la domo de la Eternulo eterne.

Psalmo 23, 6

Kio restas de homo, se li aŭ ŝi – kiel ni foje diras – “foriris”, do se kara persono mortis? Kelkfoje kiam mi legas sur jam malnoviĝintaj tombŝtonoj la vorton “neforgesata“, mi spontanee pensas: “Ĉu vere post tiom da jaroj ... neforgesata? Kiu ankoraŭ vere konas la personon, kiu portis tiun nomon, ties vivon, krom eble la gefiloj – se tiuj entute ekzistas?”

Estas trista, sed realisma konstato, ke

la morto havas grandan potencon, kiu ne finiĝas je la korpo: Ĉio havos sian finon, sian – ni diru rekte – morton: niaj pensoj, memoroj, amo, ja la atomoj de nia korpo ankaŭ kaj eĉ la tuta universo mortos ... iam longe post ni.

Foje mi vizitas nekristanajn funebrajn ceremoniojn. Kaj tie mi sentas tiun potencon eĉ pli draste: Kion alian – certe per ofte tre kortuŝaj kaj belaj vortoj – eĉ la plej bona, dungita parolisto povus diri krom, ke li / ŝi viv-IS, sed nun ne plu?

La paroĥo de Westerland, la hejma paroĥo de nia Astrid, per la supre cititaj vortoj el la psalmoj metis alian, apartan akcenton sur la funebran ceremonion, en kiu ili adiaŭis Astrid HANKE, la longjara sekretariino kaj korusmemb-ron.

Tiuj antikvaj psalmaj vortoj “Kaj mi restos en la domo de la Eternulo eterne“ alportas tute alian atmosferon: Resti en la domo de la Eternulo eterne estas alia afero, ol resti morta eterne. Tiuj vortoj aŭdacas eĉ apud tombo sentigi esperon, la esperon, ke la fino nun jam ne estas.

La foto de Siegfried Krüger montras Astrid Hanke en la jaro 2013 dum GEK en Nurenbergo.





Astrid HANKE naskiĝis je la 14a de julio 1936 kaj mortis je la 11a de aŭgusto sur la insulo Sylt en norda Germanio. Profesie ŝi estis sekretariino de la paroĥo de Westerland / Sylt, hobie ŝi amis kanti kaj tiel dum multaj jaroj kantis en koruso de sia paroĥo. Ŝi neniam estis edziniĝinta kaj ne havis infanojn.

Astrid estis membro de KELI jam ekde 1974. Mi nepre volas menci, ke ŝi por la germana KELI-sekcio estis dum multaj jaroj kasistino kaj prizorgis la burokratajn aferojn por prezenti Esperanton okaze de la Ekleziaj Tagoj. Tiun grandan renkontiĝon por kristanoj, kiu okazas ĉiun duan jaron ie en Germanio. Ŝi ofte mem vizitis tion, por tie informi pri Esperanto kaj KELI. Pro ŝia longjara laboro por KELI kaj Esperanto en Germanio ni dankas al ŝi.

Ni bedaŭrinde nur 2 aŭ 3-foje renkontiĝis persone. Sed mi volonte rememoras ŝian afablan karakteron kaj helpon kaj ŝian voĉon. Post ŝia retiriĝo el la estraro ni kelkfoje, sed kiel mi nun bedaŭras nur tre malofte, telefonis.

Mi supre menciis la alian atmosferon de kristana kaj nekristana funebra ceremonio. Estas fakto: Se ni rigardas al la potenco de la morto, ni ekscias, kiel rapide forpasos la rememoro pri ŝi: ja ne estas parencoj, infanoj, ... kiuj povus vivteni la rememoron ankoraŭ dum multaj jaroj.

Sed tamen mi ĉi tie nun volas skribi pri espero: Jes, ni forgesos, nia rememoro iam paliĝos, mortos, ... sed nia espero kiel kristanoj ja estas, ke la morto ja havas limigitan potencon. Ĝi ne regos super ni eterne. Ja se ĉio mortos, ankaŭ la morto mortos, ne plu estos. Nur Dio estos eterne.

Kaj se estas vero, ke ni estas liaj amataj infanoj, ĉu povus okazi, ke Dio nin forgesus? Certe ne! Ni restas en lia memoro, ni restas en li, en lia domo.

Kaj tial mi nun volas fidi al nia ĉiela Patro, ke nia kara Astrid foriris el tiu mondo al nia ĉiela Patro. Mi volas fidi, ke Astrid nun estas kaj restas eterne en la amo de la Eternulo.

Wolfram Rohloff

Kiel riverego

LIKE A RIVER GLORIOUS

1. Ki - el ri - ve - re - go es - tas Di - a pac';

ĉi - on te - ran ven - kas ĝi - a glo - ra grac'.

1-3. Kvan - kam ĝi per - fek - tas, ta - men ĉi - am pli,
Ko - roj sin kro - ĉin - taj al la E - ter - nul'

pli pro - fun - da kres - kas, pli vas - ti - ĝas ĝi.
tro - vas laŭ - pro - me - se pa - con sen ma - kul'.

2. Kiu sin forkaŝas en la Mana Kav',
se minac' alpaŝas, certas pri la sav'.
Ĝenas nek ĉagrenoj, nek diabla spit';
venas nur la benoj Diaj al spirit'.

Koroj ...

3. Ĉiu ĝoj' aŭ provo venas el Ĉiel';
sendas ĝin la povo de la Di-fidel'.
Se ni plene fidas, restas, ke ni nur
sekvu, dum li gvidas nin en plensekur'.

Koroj ...

LIKE A RIVER GLORIOUS • M (Wye Valley): James Mountain ĉ. 1876 •
angla T: Frances R. Havergal ĉ. 1876 • E: Ros' Haruo 1999